

**AVENO 36 - AVE kaj la Verdaj Partioj & Esperanto**  
*aktuale 2010-10-01 - 2011-05-27*

ordigita laŭ jenaj temoj:

ankorau aktuala, Ĝeneralaj temoj, Junaj & ne-junaj Verduloj en kontinentoj kaj landoj; aliaj partioj

Jen la ĝenerala pagharo kie vi trovas la plej multajn Verdajn Partiojn kaj kontinentajn federaciojn.

<http://www.globalgreens.org/parties>

AVE kunlaboras kun Verdaj partioj sur chiuj niveloj. Pri tio: <http://www.verduloj.org>

2011-06-30/ 07-02, Bruselo, "**Seminario por la Europa Verda Aktivisto**"

Se vi loghas en membro-shtato de la Europa Konsilio kaj volas lerni pli pri la EU-aktoroj, keil funkcias politiko en la EU-sistemo, eble tiu 3-taga seminario en Bruselo de la Verda Europa Fonduso (VEF/GEF) taugas por vi - alighu ghis 2011-05-12:

<http://www.gef.eu/event/news/seminar-greening-europe-toolkit-for-the-european-green-activist/>

La kotizo estas 50 au 90 Euroj por studentoj au ne-studentoj, respektive, sed la vojagkostoj, loghado kaj mangho estos pagataj de GEF. La laborlingvo estos la angla.

AVE shatus ke almenau unu el niaj membroj (eble vi ?) partoprenos.

VEF/GEF ankau kunmetis la diversajn spertojn kiel plani, fari kaj evalui kampanjon; la retejo montras multajn ekzemplojn kaj informojn:

<http://campaignhandbook.gef.eu/>

**2011-09-08/11 Europa Verda Somera Universitato**

Laborgrupo "Language as an issue on the identity of EU-citizens" (facts and ideas)

Multilinguality as myth for the EU and English (only) as reality.

If EU identity is desirable, what will be the role of language.

Which language and text for the European Hymn (Esperanto ? - will be presented).

Could an neutral international language like Esperanto help overcome language nationalism.

--- **Afriko** ---

Jam en multaj Afrikaj landoj ekzistas Verdaj (au ekologiaj) Partioj, kiuj kunlaboras en la Federacio de la Afrikaj Verdaj Partioj (AGF): (en, fr) [www.africangreens.org](http://www.africangreens.org)

Nuntempe mi vidas kelkajn datojn kie AVE-anoj povus partopreni:

**2011-06-25/26, Ouagadougou**, Burkinafaso, Akademio de la Afrikaj Verduloj

**2012-03, Dakaro** (Senegalio), Tutmonda Verda Kongreso. [www.globalgreens.org/senegal2012](http://www.globalgreens.org/senegal2012)

AVE intencas prezenti la temon lingva justeco pere de Esperanto. Espereble ni trovos AVE-anojn - au lokajn samideanojn - kiuj povos partopreni. AVE kutime partoprenis la Tutmondajn Kongresojn de la Verdaj Partioj (en Canberra 2001 kaj Sao Paulo 2008)

--- **Ameriko** ---

2011-05-02 Gratulon al **Elizabeth May**, estraranino de la Verda Partio en **Kanado** estis elektita en la House of Commons (Kanada Parlamento).

**Marina Silva** ne estos plu sur la listo por la decida baloto. Nur la kandidatoj José Serra kaj Dilma Rousseff. Ambaux defendas la revizion, kiu malfortigas la legxojn kiuj protektas la arbarojn en Brazilo. Bedauxrinde, ili defendas la interesojn de grandaj bienistoj, kiel la produktantoj de sojo, suker-kano kaj la bov-bredistoj.

La granda vocx-donado favore al Marina Silva almenaux instigos la du kandidatojn repensi pli serioze siajn pozicion rilate al la protektado de la medio.

Jen notico pri la projekto por sxangxi la brazilan arbaran legxaron (bedauxrinde gxi estas en la portugala):

<http://noticias.r7.com/tecnologia-e-ciencia/noticias/greenpeace-protesta-contramudancas-no-codigo-florestal-com-futebol-em-frente-ao-congresso-20100605.html>

Amike, Alvaro, Rio de Janeiro - Brazilo

Gratulon al Marina Silva, kiu gajnis preskau 20% je presidenta balotado en Brazilo (pli ol oni supozis - nun venos decida baloto fine de Oktobro. Mi ne scias chu shi estas denove sur la listo.

### --- Australio & Oceanio ---

Verduloj en Australio al-gajnis en balotoj.

### --- Azio ---

**Japanio (Midori no Mirai):** Gratuloj al la kandidatino de la Verduloj , Kazumi Inamura, kiu estis elektita urbestro de Amagasaki je 2010-11-21. Amagasaki havas 460 mil enolghantojn kaj trovigas inter Kobe kaj Osaka. Shi estas la plej juna urbestro en Japanio kaj la unua apartenanta al la verda movado; reprezentis la verdulojn je tutmondaj kongresoj. Mi ne scias chu Midori no Mirai havas la statuson de partio. Iliaj chefaj temoj estas partoprena demokratio, malferma informado kaj trovi vojon al ekologie daurigebla socio. (jp) <http://www.greens.gr.jp/> , (cn, en, fr, jp) [http://de.wikipedia.org/wiki/Midori\\_no\\_Mirai](http://de.wikipedia.org/wiki/Midori_no_Mirai)

### --- Europo ---

2011-05-27, La Federacio de **Europaj Junaj Verduloj** informas pri kaj invitas al siaj laborgrupoj: Ghendro (sekse sociala egalismo), Verda Ekonomio, Regionalismo, Klimata Shanghigho, Migrado, Digitalaj Rajtoj, Demokratio, Paco. (en) <http://www.fyeg.org/main/index.php/news/10-other/174-calls-for-working-groups>

Deklaracio de la **Europa Federacio de la Junaj Verduloj** (FYEG) en Esperanto: <http://www.fyeg.org/main/index.php/about-fyeg#esperanto>

#### **2010-10-08/10, Tallinn, Europa Verda Konsilio.**

Por AVE partoprenos Mara Timermane. Interpretataj lingvoj: estona, angla, rusa  
Chefaj temoj: Verda Nova Konsento ( Klimato, energio, ekonomio) kaj kunlaboro en la Europa Verda Partio  
Rekta komputila video-raporto "Verda Sofo" okazos je Sabato, 9-a de Oktobro, 16:30 sur <http://www.gruene.de>  
Mi ne scias en kiu lingvo (germana, anlg, ..).  
Vendrede ili informos pli detale.

2011-05-14 **Verda Europa Fonduso** lanchis sub-pagharon "en aliaj lingvoj"  
Kutime GEF (Green European Foundation) raportas en la angla - sed pli kaj pli vidis, ke ne chiu regas la anglan sufiche bone. Intertempe jam estas tekstoj en la jenaj lingvoj: cz, katalana, nl, fi, fr, de, gr, it, po, sk, sl, es, sv. vidu mem:

<http://europeangreens.us2.list-manage1.com/track/click?u=823d8d6ab731c7b48a1ee517d&id=386abe3ca0&e=bb8b45cf99>

#### **Kampanja Manlibro de la Europa Verda Fonduso:**

Sufiche ampleksa - reta "man"libro - eble ni povus elekti kelkajn chapitrojn kaj traduki. (en) <http://campaignhandbook.gef.eu/>

2010-12-3/7, Bruselo - Invito partopreni laborgrupon pri la Verda Nova Konsento post Kopenhago-16: Okaze de la UNFCCC COP16 (**Klimato-konferenco en Cancun/Kankun**) la Federacio de Junaj Europaj Verduloj (FYEG) kune kun la Junaj Amikoj de la Tero organizas interparolojn, **laborgrupojn kaj agadojn en Bruselo**. La angla titolo : "COP16 Green New Deal Workshop in Brussels" .

Pli pri la Verda Nova Konsento (angle "Green New Deal") vi trovos en Esperanto sub (Manifesto 2009): <http://www.verduloj.org/welcome.htm#Verduloj>

**2011-04 Finnlando:** la Verduloj "Vihreä" perdis iomete laŭ la procentajho al 7,2%, sed tio rezultis en perdo de 5 seghoj al nun 10 en la finna parlamento.

2011-04-17 Finnlando, tut-landaj balotoj. Espereble la Verduloj (Vihreät) ricevos pli da lokoj, char ili prezentas modernan estonteco kaj daurigebleco-orientitan politikon.  
Panu Laturi esperas ke la dekstruloj ne gajnos tiom da vochoj kiom oni prognozas.

#### **2011-04-11, Nova Verda Partio en Litovio.**

Chu iu el Litovio povas resumi chi-tiun informon - kaj eble doni personan opinion ?  
<http://www.lrytas.lt/-12882687741286737667-%C5%BEalieji-partij%C4%85-lietuvoje-ketina-steigti-kit%C5%B3-met%C5%B3-prad%C5%BEioje.htm>

**Pollando (Zieloni 2004):** Gratulon al la granda sukceso de la polaj Verduloj!

dimanĉe estis elektitaj kvin verdaj politikistoj, kiel la unuaj en Pollando. Temas pri:  
- dr-ino Małgorzata Tkacz-Janik, prezidantino de la partio kaj deputitino de Konsilio de Silezia Provinco (9100 voĉdonoj);

- Ewa Koś - deputitino de Konsilio de Okcidentpomeria Provinco (3488 voĉdonoj);
- Beata Kubica - deputitino de Urba Konsilio de Opole (430 voĉdonoj);
- Krystian Legierski - deputito de Urba Konsilio de Varsovio (5279 voĉdonoj);
- Sebastian Kotlarz - deputito de Kaŝy Wrocławskie, komunumo Smolec (455 voĉdonoj).

Pli, sed nur pole: <http://zieloni2004.pl/news-3074.htm>

En Pollando dimanĉe okazis lokaj balotoj. Politika kombino ĝenerale ne tro ŝanĝiĝis - la plej forta politike estis plu reganta

kristan-demokrata Civitana Platforma, la dua kaj plej grava konkuranto de CP estas konservativa Juro kaj Justeco. Maldekstra Alianco de Demokrata Maldekstrularo estas la tria. Tiuj balotoj estas tamen ege gravaj por la polaj Verduloj. Unuafoje ekde 2003 kiam fondiĝis la pola verda partio (Verduloj 2004) ni gajnis postenojn kaj en Pollando ekestos unuaj deputitoj en Varsovio, Opole kaj Smolec, krome en la Silezia Vojevodino (d-ino Małgorzata Tkacz-Janik, prezidantino de la partio). Kelkaj aliaj kandidatoj havis tre bonajn rezultojn.

Tio estas granda sukceso de verda politiko en Pollando! Grava paŝo estis fine farita kaj jam post unu jaro okazos balotoj por ŝtata parlamento al kiuj Verduloj 2004 planas prepari ankoraŭ pli bone. Gaje el Pollando salutas vin, verda Paweł FisKot

<http://www.zieloni2004.pl/>

**Slovakio (Strana Zelenych)** : Gratulojn al la progresoj de la slovakiaj verduloj. Je komunumaj balotoj je 2010-11-28 ili ricevis kelkajn sidajn en lokaj konsilioj, kaj pluraj estis elektitaj urbestroj (Peter Pilinsky en Racha).

**Zlatko Tishljarić** kandidato por la urba konsilio de Maribor: <http://www.zeleni-maribora.si/>

2011-04 Verduloj en **Norda Irlando** prezentis ampleksan manifeston por la venontaj elektoj al konsilioj kaj la provinca parlamento. La ĉefa trajto estas:

chiuj decidoj estu pripensataj rilate al ilia **influo al ekonomio, ekologio kaj la socio**.

La Nova Verda Kunsento ekz-e nomas:

- lasi altan imposton al bonfartaj konzernoj kaj bankoj, sed redukti ilin por regionaj kaj lokaj metiistoj, tiel altigante la resiliencan (resistkapabla)
- laborlokojn en varm-izoligo de la konstruaĵoj
- investi en regjaneblaj energioj
- investi al teknikoj kiuj evitas klimatoefikajn forcejgasojn
- remeti la akvo-provizon en komunumajn manojn
- redukti la strato-konstruadon, sed prefere plibonigi la publikajn trafiksystemojn
- investi en la sistemojn de edukado kaj sano
- pli da respondecado rilate bestojn

Per politika reformo:

- ili celas redukti la organizaj kostoj de la registaro kaj de parlamento (per reduktado de la nombro da parlamentanoj al 80), sed lasante la nombron da lokaj konsilioj, ĉar ili ligas la homojn kun la politiko
- la donacado de firmaoj al partioj devas estu malpermesata
- ĉiaj donacoj al partioj estu travideblaj

Ili kreis la sloganon: "**It's Economy, for People and Planet**": <http://www.greenpartyini.org/>

2011-05-27/29, Berlin, **Europaj Verdpartigaj Konsilistoj** renkontiĝas (lokaj parlamentanoj).

Kiu el la AVE-anoj estas (verda) konsilisto ?

Dum la plenaraj kunsidoj okazos rekta traduko en la germanan, anglan, francan, kaj eble polan kaj hispanan. Plej gravas lerni unu de la alia por ekscii la plej-bonajn praktikojn/rimedojn.

<http://www.greencouncillors.eu/>

2011-05-05 Verduloj kaj Socidemokratoj findecidis la Verd-Rughan Koalicion en Baden-Virtembergo (sudokcidenta **Germanio**).

2011-03 **Tre bonaj rezultoj por Verduloj en landaj balotoj en Germanio:**

Tio signifas por:

Rejnland-Palatinato Rugh-Verda registara koalicio

Baden-Virtembergo Verd-Rugh-registara koalicio

Ni esperas por ili saghan politikon, kaj plejeble rapidan eliron el la nuklea industrio.

En Stuttgart nun eblas halti la planitan (kaj jam komencitan laboron) shanghon de la stacidomo al sub-tera; eble per popola decido, kiun volas la SPD.

<http://www.engpass21.de/>

<http://kopfbahnhof-21.de/>

2010-11-21, Germanio (Buendnis 90/ Die Gruenen), Freiburg/Br (DE) **Esperanto je asembleo de la germana Verda Partio.**

Dank' al Michael Leibmann, Manfred Westermayer k. Ursula Niesert AVE povis prezenti la 26-jaran kunlaboron inter Verduloj & Esperanto.

Krome anoncis sin je nia stando 4 aliaj esperantistoj, kaj pluraj kiuj vere simpatias. Kompreneble multaj diris ke ni ja havas la anglan kiel mond-lingvon, ech se ili ne sukcesis mem paroli la anglan.

Por interesuloj ni ankau donis la proponitajn Sunmontajn Gvidlinojn pri a rolo de Esperanto en la Europa Unio kune kun la EU-himno en Esperanto (versio de U.Brocattelli).

Ni alparolis kelkajn el la verdaj politikistoj diversnivelaj; ekz-e Reinhard Buetikofer (MEP) kaj Winfried Kretschmann (Mdl), parlamentano el Baden-Virtemberg, kiu alparolis min preter la stando per demando kiel status Esperanto - kaj felice mi povis diri ke junuloj renkontighas internacie kaj entuziasmighas kaj ke ankau la Verduloj Esperantistaj pli-ighas malrapide kaj daurigas la kunlaboron kun la Verdaj Partioj tutmonde.

Jen la decidoj: (de) <http://www.gruene-partei.de/cms/default/rubrik/19/19071.beschluesse.htm>

Grandaj diskutoj kaj decidoj:

Energio

Por baza Civitana Sano-Asekuro por chiuj

Proksima Oriento

Financado de la komunumoj

kaj kromaj decidoj:

Pli bona Edukado

Rezigni pri la planita Fehmarn-ponto (au tunelo) al Danlando

Fini la principon de la atomarmila unue-ekpafado - redukti la atomarmilojn kaj aliajn tutmonde

Rilate Iranon - fortigi la iran civilan socion - ne damaghi la popolon per embargo-politiko, ktp.

Subteni la financadon de la Yasuni-Nacia Parko (rezigni la nafto-ekspluatadon tie)

Investi pli en varmisoladon de germanaj domoj kaj loghejoj (por ne malshpari energiajn resursojn)

Ne al Olimpiko en Munkeno 2018 - pro ekologiaj kialoj

Fortigi la laikecon de la shtato - ne subteni kristanajn religiojn pli ol la aliajn

Pli forte subteni la virin-rajtigajn UN-Rezoluciojn 1325 kaj 1820

Malpermesi la ekspluatadon de Uranio - dume postuli la respekton de Homaj Rajtoj de la surlokaj indighenoj

Politiko cele al daurigebla klimato, biodiverseco kaj evoluo

Verduloj subtenas la tutlandan Vegetaran Tagon (Jhaudon) kiel jam okazis en Bremeno

Postuli principojn de Jur-shtato en Rusio antau pli-intensa ekonomia kunlaboro - kazo de M.B.Khodorkowski (Jukos) estas unu ekzemplo.

Montri perspektivon al Ukrainio cele EU-anigho

Europa Civitana Iniciativo (1 miliono da subskriboj) devas esti ne-burokrata kaj efika

Akcepti la propran respondecon de EUropo rilate pro-klimatan migradon - pli forta evolu-helpo

Daurigebla agrikulturo devas protekti grundon kaj akvon; EFSA bezonas veran sendependecon de konzernajn interesoj

Enkonduki kanabo-produktojn en la medicinon

Malpermesi GMO-ojn "Verdan Gen-teknikon"

Racia integriĝo-politiko rilate migrantojn (amplekse)

21-jarigho de la pacema liberecana revolucio en GDR (amplekse)

Subteni la por-demokratian movadon en Etiopio

Ne al militista defendo de ekonomiaj interesoj - prefere zorgi por justaj rilatoj

#### --- Pirato-Partio ---

Ene de la nova Piratopartio <http://www.piratopartio.org> komencighis Esperanto-grupo.

Char Piratoj el Svedio estas en la komuna frakcio Verduloj & Regionalistoj & Piratoj (Greens /EFA) de la Europa Parlamento, AVE proponis kunlaboron por alparoli ankau ilin en tiu frakcio.

#### --- EEU ---

Europa Esperanto-Unio (EEU)

Avenue Louise 405, bte 9,

BE-1050 Bruselo

eeu@europo.eu , <http://www.europo.eu/en/chefpagho>

#### --- E.D.E ---

AVE kunlaboras kun E.D.E. Ekster la tempo debaloto-kampanjoj, char ne temas pri partio sed grupo kiu sekvas la saman celon; kaj fakte ili aldonas gravecon al nia agado.